

SALO GRENKAMP-KORNFELD


KRIOJ

DE L' KORO



JASLO (POLLANDO) — 1922.

ELDONEJO
„ESPERANTISTA VOĈO“
BAVARIO: OSKAR ZIEGLER & KO,
MARKTREDWITZ.



38

108091

SALO GRENKAMP-KORNFELD

KRIOJ

DE L' KORO

REKOMENDITA DE ESPERAN-
TISTA LITERATURA ASOCIO

ELDONEJO „ESPERANTISTA VOĈO“
JASLO (POLLANDO)



402486

PRESEJO „WISŁOKA“ JASŁO (POLLANDO).

M. 136/94

AL SIA AMIKO
PAŪLO v. MEDEM

KORE DEDIČAS
AŪTORO



Georg Kraus Korufeld

ĴURO AL MARO.

A! Vi, maro, je l' akvaj profundoj mi ĵuras:
Kun fraŭlin' mi neniam boate-veturos,
Nek mi iun amos, nek por iu flamos.

Ĉar ekamis mi Vian belecon elfunde,
Kiu kuŝas en verdaj akvegoj profunde.
Sin per ringoj ornamas alkonke-similaj,
Kaj ĝin kaŝas ĵaluze en ondoj trankvilaj.

Tial mi nun enĵetas koralojn helruĝajn —
Ĵur' ĝismorta ĝi estu — en ondegojn muĝajn —
Tion sciu Vi — en la juneca obstino
Mi edziĝis kun verda la mar' ĝis viv-fino.

Vieno, la 23/3 1915.



MI STARIS SUR FLORRIÇA RAND'.

Mi staris sur florriça rand'
 Enpense êe rivero;
 Similas ĝi al blu-ruband' —
 De kie malespero?

Ĉielo! — Estis ja plezur'
 Rigardi — blua, blanka —
 Sur mond' feliĉo sen mezur',
 Nur daŭra paco mankas.

Sur kamp' — kruela nun batal',
 Mortig-agado tie;
 Rikolt' nuntempe por ŝakal'...
 HOM-AMO, Di', ĝi kie!?

Freudenthal, la 21/11 1915.



PLEJ AMIKA EN LA MONDO.

(kantebla laŭ melodio: Jak to na wojence ładnie).

Plej amika en la mondo
Estas esperanta rondo.

Kara estas lingvo nia,
Esprim-riĉa, harmonia.


Al ide' nia aliĝu
kaj fervora vi fariĝu.

Restu ĉiam en laboro,
Esperanto en la koro.

Ĝis ĝin konos la homaro
Kun gepatra lingv' en paro.

Estos tiam sur la mondo
Unu familia rondo.

Opava (Troppau) en Decembro 1915.



PACIENC'!

Al la gesamideanaro.

Pacienc'! Denove estos belflorantaj
 Rozoj, kaj la plugoj teron sulkigantaj.
 Birdoj kantos bele, frue kaj malfrue,
 Kie nun batal' kruela flamas brue.

Pacienc'! Denove vundoj cikatriĝos,
 Sub standardo verda la homar' kuniĝos,
 Esperanto disvastiĝos sur la mondo,
 Kaj ekzistos unu familia rondo.

Pacienc'! El nub' vidiĝas suna brilo,
 El kristala groto ŝprucas klarafonte...
 Sole daŭru pacienco kaj trankvilo,
 Venos baldaŭ al ni paco jam renkonte.

Opĉina (itala fronto), la 7/2 1916.



TRANKVILON!

Rapide mi iros al stepo silenta,
Ĉu estos nur stepo por kor' neturmenta?
Aŭ kuros mi, iros al tero dezerta...
Kor' eble silentos — ne estas mi certa.

Premegas min am', mi memoras...
Tempon pasitan... Tro doloras
La koro; mi vivi ne povas —
TRANKVILON! Kie ĝin mi trovas?

Bogumin (Oderberg), la 16/6 1916.



VARIAĴOJ.

I.

Por mi ne, Vi, printempo kara,
 Por mi ne tero bela...
 Ĉar en patruj' familiara
 Malbeno nur ĉiela!

II.

Kaj kiam estos tempo bela,
 Pli saĝa la homaro?
 Kaj kiam regos pac' ĉiela
 Kaj unu la frataro?

III.

Homaro nia ne atentas
 La vortojn: Paco, Amo...
 Kaj homoj time nur silentas,
 Sed forta por pac' flamo!

IV.

Batalas el popoloj ĉiu
 Por paco nur konstanta
 Kaj dum la pac' laboris ĉiu
 Por paco — armiganta!..

PER TUTA MIA KORO...

Por mi sufiĉas — naturo kaj beleco de tiu ĉi tero... Mi nur adoras la bonodoron de l' floroj, admiras la belajn vidindaĵojn, volonte mi aŭskultas murmureton de libera rivereto fluanta en arbara ombro, kaj ĉion, kio sin trovas sub arkaĵo ĉiela kaj ĝia firmamento, mi amas per tuta mia koro...

Bogunin (Oderberg), la 19/9 1916.



AL. B. K.

Inter la mirinde bela bloveto printempa, kiu mian koron inspiras per ĝojeco de l' vivo, alflugas al mi senĉese kaj konstante ama ekblovo de el J...., kiu min rave kaj karese sorĉigas, kaj per sia malgaja, melankolia alpremo kortuŝas...

En la revojn, kiujn mi nuntempe travivas, trapenetas Via lumplena kaj hela aspekto. —

Devige, pro milita servo haltigita en B...., foriĝi mi ne povas, sed tamen sur flugiloj de miaj revoj mi estas en J.... kaj freŝigas rememorojn.

Bogumin (Oderberg), la 30/9 1916.



DU, KIAM SIN ŜATEGAS...

Du, kiam sin ŝategas,
En amo kaj fidel',
Tra viv' ligitaĵ iras
Junec' — jen la model'!

La sonoriloj sonas
En plena tiam ton',
Benata ĝoj-allogo
Aŭdiĝas antaŭ tron'.

La amo sen riproĉo,
Al ambaŭ venas jen,
Ĉar Vi, Ĉielaj Muzoj,
Fortigas ĝin per ben'.

Bogumin (Oderberg), la 25/10 1916.



DEZIRO.

Por mi bela estas mondo
Kara estas la homar';
Sed nur ploras en la rondo
Malfeliĉa popolar'.

Kiam venos tempo paca?
Venu baldaŭ ĝi al ni!
Mond' sanganta, militlaca:
Ni laboru, helpu Di'!

Opava (Troppaŭ), la 5/6 1917.



BALADO.

Knabin' poŝkeŝton aliras
 Kun larm' en brila okulo
 Kaj nomon karan buŝ' spiras,
 Dum skribon ŝi por karulo
 Enmeti keŝton intencas.
 Balado tiel komencas.

Kaj migras nun la letero,
 En sia griza kovrilo,
 Al sang-angulo de l' tero.
 Soldatoj, kie kun brilo
 Sovaĝa, glavojn ĝoj-svingas.
 Letero — celon atingas.

Ne trovis ĝi nur soldaton,
 Veninte iom malfrue.
 Freŝ-tombo kaŝas amaton,
 Persablas vento ĝin brue...
 „Hero“ jam tut-forgesita —
 Leter' — returnen sendita.

Kaj ŝin dorlotas espero
 De tago longe pasinta,

Ĝis fine venas letero
Kun not' hioba: „falinta“!
Vekrio, sveno, plorado...
Jen fino de la balado.

Krakovo, la 10/8 1917.



VI ESTIS...

Kantebla laŭ propra melodio.

Al fino B. K.

Vi estis floro printempa mia,
 Beligis al mi ĉiun viv-horon;
 Vi estis por mi suno radia —
 Vi estingiĝis — lasis doloron...

Vi fantazio estis flugila...
 Nun mia koro febre deliras
 Pro perdo Via — en viv' senbrila
 Ĝi sentas froston, al tomb' sopiras...

Krakovo, la 21/9 1917.



BIBLIOTEKA
 UNIWERSYTECKA
 w TORUNIU

MALĜOJO.

Malĝoje kaj malplene jen en mia domo...
 Vi, kie kantoj, pri feliĉo, pri jun-aĝo?
 Sin trovas nur ĉagrenoj en la kor' de homo,
 Maldolĉa malgajeco eĉ dum la vojaĝo...

En kia malfeliĉa stat' troviĝas mondo,
 Ĝi, sangon de senkulpaj homoj elverŝante,
 Militas en aero, eĉ sub la mar-ondo...
 Bataloj-kamp' kruela ŝanĝas sin konstante...

Kor mia' malfeliĉa ploras nur kaj ĝemas...
 Forestas amatino — ne pri tio temas,
 Ekamis mi homaron, diras mi kuraĝe.
 Kunligu, Di', infanojn per pac' daŭra saĝe!

Krakovo, la 21/9 1917.



AL AGADO.

Kunligu ni nun manojn kore,
 La temp' malama jam forpasis.
 Jen malproksime sur ĉielo
 Tagiĝas kaj disnebuliĝas...

La ora suno hel-vestita
 Sciigos al la tuta mondo,
 Ke la milito jam finiĝis,
 Ke frat' nun fraton ne atakos.

Ĝi estis iam — jam finiĝis
 Malbena temp'! — Antaŭen ni!
 Kaj antaŭ ni labor' grandega:
 Ke HOM' fariĝu fine — HOMO!

Esperantistoj, karaj fratoj!
 Ni estu la unuaj ĉie
 Kaj nur laboru por la A M O
 Kaj por JUSTEC' kaj LIBERECO!

Do, karaj fratoj, al agado!
 Ni levu nian verd-standardon!
 Kun la devizo: PACO, AMO
 Kaj faru „rondon familian“.

Krakovo, la 1/1 1919.

MI AMAS VIN.

Al fino M. B.

Mi amas Vin! Dolcêc' de la rigardo
Via el mond' la sorc'vizion faras.
Kaj mond', la tuta mia, sub la mano
Via, kaj sub piedo la malgranda...

La bat' de Via kor' sub brusto Via...
Jen la horloĝo por la vivo mia —
La tagoj miaj kuras laŭ la bato —
Kvieta, de koreto Via.

Novy Targ, la 21/5 1919.



NUR MALLONGE DAŪRAS AMO...

Al fino M. de R.

Nur mallonge daŭras AMO,
Ĝi komence floras;
L' AMIKEC' ne nura flamo,
Tra l' tut-viv' valoras.

Jaslo, la 20/8 1921.



ĈU KONGRESAN TEMPON VI MEMORAS?

Al...

(Kantebla laŭ ario de Eleazar
el opero „La Judino“ de Halevy).

Marginjo ĉu kongresan tempon Vi memoras
Kaj la promeson tiam, ami min?
Nune mi hejme tremas, timas kaj nur ploras,
Ke Vi ne amas nur forgesis min.

Kiel vivi nun sen Via amo,
Se kunigis nin jam la sort'.
Ĉiam amos mi kun forta flamo
Vin, memoros por ĉiam ĝis mort'.

Jaslo, la 20/8 1921.



AL VI OFERAS SONGON MI VUALAN...

Al Vi oferas songon mi vualan,
Al Vi oferas ĉiujn miajn revojn,
Eĉ mi oferas cerbon, ankaŭ devojn...
Kaj jen forlasas mondon la realan.

Sopir' sovaĝa, ĉiam nekvieta,
Por Vi elkreskas, kiel flor' por suno...
Mi nun jam vidas kun ĉagren' sekreta,
Ke ili kreskas por pere' komuna...

Vi estas suno mia, sed post nuboj...
Kaj ĉirkaŭ Vi ludantaj la keruboj...
Vi estas el fabel' reĝin-fratino...

Kaj kvankam malproksima land' dividas,
Mi ĉiam pense ja ĉe Vi nur sidas
Kaj revas: ĉu min amas karulino?

Jaslo, la 21/8 1921.



LA HOMAMASO.

La hom-amaso estas tutsimila
 Ĉu en Eŭropo ĉu en part' alia —
 Al ŝip' vaganta sur mar' maltrankvila,
 Ĉiam estante en stat' emocia...

Jen preta al mortig' — ebria —
 Kaj al milit' piedpremadas vivon...
 Kaj kio pcst milit' — pripens' nenia!
 Nin forgesante falas ni deklivon.

Sed mi bestecon ne forgesi povas
 Kaj ĉiun eblon mi pacema provas —
 — En Esperanto mi nur solvon trovas!

Lingvo de l' paco ĉiujn ja kunigos,
 La tutan mondon kvazaŭ ĉene ligos,
 Kontraŭ popol' — popol' ne plu intrigos.

Jaslo, la 23/8 1921.



AMAS VIN MI, KARA MIA...

Kantebla laŭ la rusa
melodlo „Volga“ de Gogol.

Amas Vin mi, kara mia,
Amos Vin mi flame nur.
Lingvo ligis harmonia
Nin por ĉiam eĉ sen ĵur'.

Nur ne devas Vi forgesi
Ami min, neniun plu.
Al alia ne promesi
Iri al la rendevu'!

Nur aferon nian ami,
Mi permesas por la bon';
Por ĝi devas koroj flami
Kaj labori sen admon'.

Jaslo, la 10/9 1921. .



LA KORO.

Kantebla laŭ propra melodio.
Al fino M. J.

Mizera koro kiel flor',
Sun-manko ĝin svenigos...
Ne ĉesos daŭri ĝia plor'
Ĝis mort' ĝin kvietigos...

Gardegu do, ke Via kor'
Ne elreviĝu frue...
Ke ne ekdormu ĝi en hor'
Ĉagrene kaj enue...

Jaslo, la 20/9 1921.



ĈIO EN MONDO JA FINE
FORPASAS...

Al mia amiko Paŭlo v. Medem.

Ĉio en mondo ja fine forpasas;
Ĝojon, potencon eĉ, tempo ne lasas.
Tie momentoj feliĉaj nur fluas,
Kie sinceran amikon ni ĝuas.

Jaslo, la 14/12 1921.



LA FELIĈO NE EN AMO...


L a feliĉo ne en amo;
Am' nur revo, iluzi'...
Venas ĝi nur kiel flamo
Kaj doloras sen konsci'.

La feliĉ' nur en laboro.
En laboro, en ofer'.
Ne en amo al virino,
Sed nur en la sinofer'.

Do memoru kara mia,
Ne forgesu fratojn nur.
Ilin ami per kor' Via,
Vi ja povas sen mezur'.

Ne virinon nur priplori
Kaj pensadi pri konfes',
Sed por ĉiuj ni labori
Devas ĉiam sen forges'!

Jaslo, la 12/12 1921.



ĈU MI VIN AMIS?...

Ĉu mi Vin amis?...
 Tion mi ne scias
 Sed ŝajne tamen iom por Vi flamis.
 Ĝi songo estis
 Tion vi konscias...
 El song' maldorma jam nenio restis...

Ĝi estis io
 Kvazaŭ blanka ĵoro ●
 Rakont-fragmento, — sed jam plu nenio...
 Vi tiam havis
 Laŭ mia memoro
 Nur dekok jarojn, kiam Vi min ravis...

Ĝi estis iam
 Tempo nun forpasis
 Vi edziniĝis, mi ne sciis kiam —
 Vi opinias
 Ke mi vin forlasis
 Ĉu estis tiel, Vi nek mi ja scias...

Jaslo, la 23/3 1922.

DOLOR' FORTIĜAS...

El kor'
 Melankolion mi elŝiris...
 Kaj AM'
 Ĝi ankaŭ jam FORIRIS!...

Sed tamen VOLAS MI SOPIRI —
 Por kio nek mi scias diri
 Nek mi povas...

DOLOR' sur la tombejoj VAGAS...
 Sed en l' animo ankaŭ agas:
 ĜI SIN KOVAS...


DOLOR'
 Sidanta sur ruin' FORTIĜAS...,
 Per ĜEM'
 De l' temp' al temp' MONTRIĜAS...

Jaslo, la 24/3 1922.



ENHAVO:

Juro al maro	5
Mi staris sur floriĉa rand'	6
Plej amika en la mondo	7
Pacienc'	8
Trankvilon	9
Variaĵoj	10
Per tuta mia koro	11
Al. B. K.	12
Du, kiam sin ŝategas...	13
Deziro	14
Balado	15
Vi estis	17
Malĝojo	18
Al agado	19
Mi amas Vin	20
Nur mallonge daŭras amo	21
Ĉu kongresan tempon Vi memoras	22
Al Vi oferas songon mi vualan	23
La homamaso	24
Amas Vin mi, kara mia	25
La koro	26
Ĉio en mondo ja fine forpasas	27
La feliĉo ne en amo	28
Ĉu mi Vin amis	29
Dolor' fortiĝas	30



Biblioteka Główna UMK



300001779327



Boeje esper. 205
Epexh. t; Gv

20,000,-

ELDONEJO
„ESPERANTISTA VOĈO“.
JASLO (POLLANDO)

Bankkontoj:	Poŝtĉekaj kontoj:
Wiener Bank Verein, Wien I.	Varsovio Nro 140.683. Leipzig Nro 89.713.
Wohl & Ko, Danzig.	Praha Nro 59.354. Zürich Nro 7.263.

Ni liveras ĉiujn esperantajn librojn. Al konstantaj mendantoj ni konsilas malfermon de konto ĉe ni. Postulu nian katalogon.

Ni rekomendas inter aliaj:

Baŭcki, Ama bileto, komedioto unuakta, trad. F. Ender.

Elski kaj Eska, Unuaj agordoj.

Orzeszko, A... B... C..., noveleto, trad. F. Ender.

Kabe, Internacia krestomatio.

Ŝapiro, Babiladoj de bonhumora Zamenhofano.

Grenkamp, Penseroj.

Azevedo, Amo per proverboj trad., A. Fernandes
Ossaka, Perloj el la oriento.

Ni serĉas interrilatojn kun ĉiuj esperantaj librejoj kaj volonte reprezentos ilin en Polujo.